

Sur La Vojo Al Old Firehand

Je la sekvinta tago mi atingis malaltaĵon en la Gravel-prerio, kie mi volis renkontiĝi kun Winnetou. Sed mi devis atendi lin plenan semajnon. Mi ne suferu mizeron dum tiu tempo, ĉar tieis amaso da ĉasbestoj. Kaj la regiono ankaŭ ne iĝis solece aŭ enuiga al mi, ĉar tie ĉirkaŭmigradis pluraj trupoj da Suoj, tielke mi ĉiam estis moviĝante, pro ne esti trovata de ili. Kiam Winnetou venis pli poste, kaj mi anoncis al li la ĉeeston de la ruĝuloj, li konsentis pri mia propono tuj plurajdi.

Mi tree ĝojis, kiel dirite, finfine interkonatiĝi al la fama Old Firehand. La vojo al li ne estis sendanĝere. Tion ni ekkonis jam je la sekvinta tago, kiam ni ektrivos la spuron de indiano, kiu malfacile povis esti io alia, sed esploristo.

Ni zorge ekzamenis la teron. La ĉevalo de la ruĝulo estis ligita al enterigita bastono, kaj estis formanĝinta la duonsekajn erojn de la preria hebaro. La rajdinto estis sidinta sur la tero kaj ludinta kun la sagujo. Dum tiu tubo de unu sago disrompis, kaj kontraŭ la kutima gardiĝo de la indiano li estis lasinta ĝin tie. Winnetou levis ĝin pro rigardi al ĝi. Ne estis ĉasa, sed milita sago.

„Li estas sur la milita vojo“, li diris. „Sed li estas ankoraŭ juna kaj nesperta, alikaze li estu kaŝinta la perfidajn aĵojn, kaj la piedaj premsignoj ne estas tiuj de plenkresita viro.“

Vido al la pluirantaj premsignoj sufiĉis pro ekscii, ke la ruĝulo estis forlasinta la lokon nur antaŭ nelonga tempo; ĉar la randoj de la signoj ankoraŭ eĝis, kaj la pasitaj aŭ terenkurbitaj herboj ne estis plene rerektiĝintaj.

Ni sekvis la spuron plu, ĝis la ombroj iĝis pli kaj pli longe. Ĝi komencis malheli, kaj ni estis devigitaj deĉevaliĝi, se ni ne volis perdi la spuron.

La ĉeesto de indiano sur la militvojo en tiu ĉi regiono ŝajnis al mi pripensinde. Laŭ mia takso ni nun troviĝis ĉirkaŭ tagrajdadon sudoriente de Fort Niobrara, kiu estis konstruita kelkajn jarojn antaŭe apud la samnoma rivero. Mi jam estis tie unu fojon, fakte tutan vintron, kaj tial sufiĉe konis la regionon.

Kion, se la ruĝuloj intencis nun ataki tiun militan postenon? Tiu penso ne estis rekte forgesinda, des malpli, ĉar tiaj atakoj ne estis maloftaĵoj. Fakte oni ne iluzii troiĝite pri tiuj fortikaĵoj. Kelkaj lignodometoj kaj provizejoj sur en la ĉirkaŭo eminenta altaĵo, ĉi ĉio ĉirkaŭita de palisara barilo — tio kutime estis ĉio. Subigan impreson tia „fortikaĵo“ faris tute ne, ankaŭ ne al la indianoj, kiuj kvankam ĝenerale estis en malavantaĝo kontraŭ la bonege armitaj okupaj trupoj. Ĉar pro ne provoki la ruĝulojn, ĝenerale nur malmultaj defendantoj estis surpostenigataj en tiu fortikaĵoj, kaj krome la estro kutime havis la striktan ordonon gajni la fidon de la indiana popolaro per modera konduto.

En pacotempoj fortikaĵo en indiana regiono havis sufiĉe nemilitecan aspekton. La ruĝhaŭtuloj, kiuj loĝis en la proksimo, ŝate starigis iliajn tendojn antaŭ la pordego, pro interŝanĝi varojn, aŭ — almozpeti, kaj ankaŭ anoj de pli malproksime loĝantaj triboj kelkfoje alvenis, pro ŝanĝi la gajnaĵojn de la ĉasado pro tabako kaj aliaj ŝatataj aĵoj.

Nia vojo al Old Firehand fakte estus kondukinta nin sufiĉe for en la okzidenton de la fortikaĵo trans la Niobrara River. Sed unuflanke al ni — kiel ĉiam en la sovaĝa okzidenton — estis avantaĝa scii, kiu kaŝiris malantaŭ ni, kaj aliflanke estis simple devo de la homareco averti la garnizonon en la fortikaĵo, se minacis danĝero de tiuj ruĝuloj.

Tial ni sekvis, kondukante la ĉevaloj per la rimenoj laŭ la spuro tiel longe, ĝis la komencanta malhelo haltigis nin. Sed nun la spuro estis tiel freŝe, ke la esploristo — tion ni kredis esti la indiano, kiel dirite — ne povis esti ne tre for de ni. Kaj ĉar neniu indiano, kiel mi konis ilin, foriĝas je la vespero piedire ne malproksime de la restejo, tial la ĉefa trupo devis esti tre proksime. Per tiu kaŭzo mi volis ekzameni la ĉirkaŭon pri indianoj. Mi petis Winnetou:n resti tie kun la ĉevaloj, kaj kaŝiris gardiĝe plu en la ĝisnunan direkton.

Kvankam mi povis havi la certan konvinkon, ke la ruĝuloj ne havis ideon pri nia proksimeco, mi kaŝiĝis laŭeble bone. Mi ne jam estis longe antaŭiĝinta, kiam mi flaris la odoron de brulanta fajro. La ruĝuloj do pensis sin esti tre sekuraj, sed tio ne povis esti kaŭzo al mi malaltigi mian gardiĝon. Ĉiam de branĉo al branĉo mi kaŝiris antaŭen, kaj fine venis tiel proksime al la *indsmen*:oj, ke mi povis, kuŝante malantaŭ arbedo, nombri kaj rigardi ilin.

Estis ĉirkaŭ cent homoj, ĉiuj ŝminkitaj per la militaj koloroj kaj parte armitaj per sago kaj arĉo, aliparte ankaŭ per pulvopafiloj. La nombro de la alfostitaj ĉevaloj estis ege pli granda, kaj tio certigis mian supozon, ke la indianoj volis haviĝi akiraĵojn.

Tiuj ekscioj nur eblis, ĉar la ruĝuloj bruligis tri fajrojn, ĉirkaŭ kiuj ili restiĝis en grupoj. La lumbrilo sufiĉis pro ekkoni la pentraĵojn sur la vizaĝoj: estis Ponkoj, kiuj apartenas al la plej militemaj parencoj de la Suoj.

Aparte de la tri fajroj, sed ankoraŭ en la lumo, sidis du ruĝuloj plu. Ilia aparteco de la aliaj divenigis min, ke ili estis la ĉefoj, kaj se ajn io estis kaŝaŭskultinda tie ĉi, tio estis

aŭskultebla de tiuj du. Tial mi iris laŭ kurbaĵo, kiu kondukis min malantaŭ ĉerizarbedon. Mi sukcesis min iĝi tiel en ĝian branĉetaro, ke ili tute kaŝis min. Kaj nun mi kuŝis tiel proksime al la du estroj, ke mi estus povinta tuŝi ilin per la etendata mano.

Mi estis veninta je la ĝusta tempo, ĉar ĵus en tiu momento diris unu el ili, kies hararo estis ornamita per du agloplumoj, kaj kies vizaĝo estis dike ŝminkita per koloraĵo:

„Mia frato ne agis bone, ke li malstarigis sian *wigwam*:on kaj forrajdis kun siaj militistoj.“

„Kion la ĉefo de la Ponkoj volas diri per tio?“ la alia demandis.

„La soldatoj de la palvizaĝoj certe ekhavis suspekton per la malapero de miaj fratoj, kaj nun agos gardiĝe. Estus estinta pli saĝe resti tie.“

„Parranoh pripensu, ke tiukaze lia atako al la ligna fortikaĵo estus iginta nin inter du interbatalantajn partiojn.“

„Mia frato estus povinta esti sen zorgo. La militistoj de la Ponkoj estus subigintaj la palvizaĝojn tiel rapide, ke la surprizitoj ne estus havinta la tempon ekpreni la armilojn. Sed tiel ili estas avertitaj.“

„La fama ĉefo lasu siajn pridubojn. La palvizaĝoj estas kiel malgrandaj infanoj, kiuj ne jam lernis pensi. Kiam la suno banas sian vizaĝon la duan fojon en la akvo de la Niobrara, la skalpoj de la blankuloj pendos de la zonoj de la ruĝaj militistoj. *Hongh!*“

Mi estis aŭdinta sufiĉe. La aŭskultita interparolo pruvis al mi, ke mi jes estis supozinta ĝuste: la ruĝuloj volis ataki Fort Niobrara:n. Nia tasko nun estis averti la garnizonon kaj malebligi la intencojn de la Ponkoj.

Plua aŭskultado estus estinta nenecesa, nun kiam mi estis aŭdinta la ĉefajon, kaj eble nur estus iginta min en danĝeron. Tial mi malrapide kaj sensone elŝovis min de sub la arbedo, kiu estis estinta mia kovrilo, kaj alstrebis, laŭlonge etendante sur la tero, iĝi ekster la aŭdebleco de la ruĝuloj.

Estis tute senstela nokto, kaj krome novluno. Tial tieis ega malheleco, kiu estis kvazaŭ nigra kaj netrasidebla muro antaŭ miaj okuloj. Mia reeniro do estis, ĉar ĝi devis esti farata tute senbrue, tre malfacile, kaj mi antaŭeniĝis nur tre malrapide. En tiuj situacioj la sensoj de okzidentulo evidentigas nekredeblan akrecon, kiun li sed povis atingi nur per longjara provado, kaj pri kiu la nespertulo ne povas havi ideon.

Laŭ mia takso mi finfine estis antaŭeniĝinta tiel for, ke mi ne povis esti aŭdata plu de la ruĝuloj. Je mia maldekstra mano estis arbedo, kion sed plie la sento ol la okulo malkaŝis al mi. Kiam mi estos pasinta ĝin, mi volis rektiĝi kaj hasti reen al Winnetou, kiu certe jam estis ekzorginta pri mi.

Sed tio ne estis tiel facile al mi.

Mi ĵus estis antaŭiĝinta ĉirkaŭ la arbedo kaj volis ekstari, kiam mi ekrimarkis du brilantajn punktojn ĵus antaŭ miaj okuloj. Mi tuj sciis, kion mi pensu. Same mallaŭte, kiel mi estis kaŝirinta de la restejo de la ruĝuloj, tiel neaŭdebla iu alia venis alrampante de la alia flanko. Mi estis aŭdinta eĉ ne la plej mallaŭtan soneton, kaj ankaŭ la alia ne estis aŭdinta min. Sed mi sciis ekzakte: same bone, kiel mi estis vidinta liajn okulojn, kiu per la streĉanta vidado elbrilis fosforeskan lumeton, sambone li certe estis rimarkinta miajn.

Mi apenaŭ povis finiĝi tiun penson, tiam jam grandega nigra ombro ĵetiĝis sur min. Dio, tiu ulo havis forton! Malgraŭ la malhelo lia salto estis tiel ekzakte prikalkulita, ke mi jam kuŝis sur mia dorso, antaŭ mi povis ekfari nur unu etan aĵon pro defendiĝi. Lia dekstra genuo pezis sur mia brusto, kaj dum li kunpremis mian gorĝon per la maldekstra mano, ke mia konscio preskaŭ malaperis, li kunpremegis miajn manojn per la dekstra pugno kiel en ŝraŭbopremilo.

Sed mi ne intencis lasi min ‚neigi‘ min tiel sendefende. Mi kunigis la kruojn proksime al la korpo, kaj rapidiĝis per ega eko alten, tiel ke la kontraŭulo devis lasi mian kolon, kaj mi refalis sur mian flankon. Kaj nun komencis luktado, pri kiu mi ankoraŭ hodiaŭ memoras nur kun timtremo.

Dum mia okazoriĉa vivo mi jam estis havinta multajn kontraŭulojn antaŭ mi, kaj ofte ili ne estis facile solvebla tasko al mi. La plej ega kaj danĝera interbatalo certe estis tiu kun Winnetou, kiun mi priskribis en la unua volumo de tiu ĉi vojaĝorakonto. Sed eĉ tiu ne povis esti komparebla al tiu ĉi senindulga, senbrua luktado meze en la plej nigra malheleco.

Jes, estis sensona luktado.

Memkompreneble tute ne estis mia intenco atentigi la ruĝulojn pri mi, pro kio mi evitis laŭforte kaŭzi brueton. Kaj mia kontraŭulo ŝajne havis la saman intencon, ĉar li ankaŭ ne faris unu sonon. Mi nur aŭdis lian streĉitan spiradon.

Kiam mi estis ekrektiĝinta, li estis devinta lasi mian kolon. Mi tuj uzis tiun avantaĝon. Eke dispuŝante miajn du kubutojn per forta movo, mia dekstra mano ekstis libera. Pensorapide mi etendis ĝin al la zono, al la *bowie*-tranĉilo. Sed mia kontraŭulo ŝajne sentis tiun movon, ĉar lia maldekstra pugno tuj kunpremis la muskolojn de mia dekstra suprobrako per tia forto, ke mi plej ŝate estus ekkriinta, kaj ke mi faligis la tranĉilon.

Mia movo ŝajne memorigis la malamikon, ke ankaŭ li posedis tranĉilon, ĉar li tuj eklasis mian brakon kaj nun etendis mem la manon al la zono. Tion mi certe ne povis vidi, maksimume diveni. Sed kion li sukcesis, tion mi ankaŭ kapablis. Fulmrapide mi ekprenis lian suprobrakon kaj kunpremegis ĝin, tiel ke mi kredis, ke mi aŭdis la oston kraketi.

Ankaŭ tio ne decidigis la batalon pro mia bono. Mia kontraŭulo ja same kiel mi antaŭe, devis lasi la tranĉilon, sed en la neksta momento li ree estis ekpreninta mian gorĝon kaj kunpremis ĝin, tiel ke mia spiro ĉesis. Sed mi dum tio ne restis sensulde al li, sed donis al li tian fortan boksbaton sur la stomakejon, ke la doloro igis lin relasi mian kolon libere.

Kiel longe la luktado daŭris, tion mi poste ne povis diri. Fakte ne estis eble, ke ĉi ĉio daŭris multe longe ol unu minuto, sed al mi ĝi ŝajnis kiel eterneco. Sed tio certis: tiun fojon mi havis viron antaŭ mi, kiu estis samranga, se ne pli forta ol mi.

Mi konfesas ŝate, ke tiu ekscio plenigis min per speco de kolero, kaj ankaŭ per honto. La fiero de la okcidentulo vigliĝis. Tio duobligis la forton de mia klopodo. Samtempe mi rimarkis, ke mi estis preskaŭ je la fino de miaj fortoj. Io devis okazi tre rapide, se la interbatalo ne finiĝu en malvenko.

Mi kunigis miajn lastajn fortojn, kaj kelkan momenton mi sukcesis liberigi ambaŭ miajn manojn. Ekpreno de la kolo de la kontraŭulo per la maldekstra, kaj batego per la pugnigita dekstra mano sur la tempion — ĉu mi trafis ĝin je la ĝusta loko, mi certe ne povis diferencigi —, kaj la fingroj de mia malamiko malstreĉis kaj lasis min.

Apenaŭ, ke mi repovis spiri, mi faris tion, kion mi pensis en mia situacio esti la sola ĝusta faro — per kelkaj saltoj mi hastis flanken kaj ĵetis min — tremante per elĉerpiĝo je la tuta korpo — reen sur la teron.

Neniun momenton tro frue! Ĉar, mi tute ne sukcesis senkonsciigi mian kontraŭulon. De la loko, kiun mi ĵus estis forlasinta, mi aŭdis obtuzan baton, kvazaŭ unu korpo ĵetiĝas per ĉiu forto sur alian — tiam ĉio estis kviete, tute kviete, kaj mi ne plu povis aŭdi ion, escepte de la ekscita batado kaj frapado me mia propra koro.

Estis facile pensebla, kio estis okazinta. Mia pugnobato estis subiginta mian kontraŭulon nur momenton. Tiam li estis deskuinta la senkonscieton, kaj ĵetiĝinta per nova forto sur min — laŭ lia opinio. Sed kiam li trovis, ke la loko, kie li estis sentinta min nur momenton antaŭe, estis malplena, li agis ekzakte kiel mi — intertempe li restis kuŝante senmove. Ĉiukaze li diris al si mem, ke mi sukcesis fuĝi, kaj ke estis vane serĉi la malamikon en la reganta malheleco.

Rilate al mi, mi neniam estus ekideinta, eĉ se mi estus havinta esperon pri sukceso, ekatiki la nekonaton duan fojon. Fakte mi estis rimarkinta ion, kiu nun miregis min. Nun mi pensis pri tio. Ne estis indiano, kiel mi estis pensinta antaŭe, sed blankulo. Dum la ekpreno de lia kolo mi estis tuŝinta sufiĉe longan barbon, kaj ĉar la indianoj ne havas barbojn, tiu konkludaĵo estis evidenta. Kaj plue mi konkludis, ke estis viro, kiu havis la saman intencon kiel mi kaŝaŭskulti la indianojn, sed estis malhelpinta per mia interveno.

Kion la alia nun do planis? Ĉu li eble ankoraŭ atendis min, tie, kie ni disiĝis? Certe ne! La tuta okaziĝo videbligis, ke tiu viro estis tre gardiĝa, kaj se mi pritaksis la kontraŭulon ĝuste laŭ tio, li certe ne estis tro malgaje pri la fakto, ke la afero estis finiĝinta en ĉi tiu maniero, same kiel mi ja ĝojis, ke mi povis disiĝi de li.

Sed tamen mi devis iri reen al la batalejo. Mi ne devis lasi mian tranĉilon tie, kiun mi devis faligi, jam ne pro la ruĝuloj. Kontraŭ tio estis nur unu konsidero: kio, se la alia ekspektus, ke mi serĉus mian tranĉilon, kaj tial atendis min tie? Tamen — ĝi devis esti aŭdacata.

Per plej ega gardiĝo mi proksimiĝis al la batalejo. Mi bezonis plenan duonan horon, ĝis mi konvinkiĝis, ke la alia ne plu tieis, kaj pluan duonan horon, ĝis mi estis transserĉinta la tutan lokon colo je colo. Mia *bonnie*-tranĉilo ne plu estis tie — certe mia kontraŭulo estis forpreninta ĝin dum la serĉo pri sia propra.

Dum tiu horo mi ne sentis tro sekure, pro la ruĝuloj, kiuj troviĝis en la proksimo, kaj mi elspiris senpezigitate, kiam mi finfine povis foriri. Laŭeble rapide mi iris reen al Winnetou.

De mia ekiro estis pasigintaj preskaŭ tri horoj, kaj Winnetou kompreneble scivolis aŭdi la rezulton de mia longa eksplorado, kvankam li ja ne eldiris unu silabon pri tio. Sed antaŭ ĉio mi senvorte ekprenis la kondukilon de mia Hatatitla, kaj elpaŝis sur la

perion. Ĉar mia ago certe havis gravan kaŭzon, Winnetou imitis mian konduton sen hezito.

Kiam mi povis supozi, ke la sono de la piedbatoj de la ĉevaloj ne plu aŭdeblis en la restejo de la ruĝuloj, mi surseliĝis kaj trotigis mian nigran virĉevalon. Winnetou silente sekvis min. Nur kiam ni estis pasintaj du mejlojn, mi ĉesirigis mian nigroĉevalon kaj deĉevaliĝis. Winnetou faris la samon. Ni metis katenojn al la piedoj de niaj ĉevaloj, tiel ke ili povis paŝtiĝi libere, sed ne povis foriri tro malproksime, kaj tiam ni sidiĝis, sed sen ekagi pro ekbruligi fajron.

Nun fine estis la tempo doni klarigojn, kaj mi rakontis miajn spertojn al Winnetou. Li interrompis min per neniuj vorto. Nur kiam mi priskribis al li mian senrezultan interbatalon kun la nekonata fremdulo, li diris mirigite:

„Uŝ! Se mia frato Ŝarlih ne estus certiginta al mi tute serioze, mi ne kredus ĝin. Winnetou neniam estis ekkoninta unu palvizaĝon, kiu povus samrangi kiel Old Shatterhand. Mia frato parolu plu!“

Kiam mi estis finparolinta, estis longa paŭzo. Ĝi estis tiel malhela, ke mi ne povis vidi mia amiko, kvankam li sidis tre proksime al mi. Multe malpli mi do povis rimarki la impreson, kiun mia rakontado faris al li.

Mi delonge estis kutimiĝinta al la neparolema maniero de Winnetou. Sed kiam ankoraŭ ne venis respondo de lia flanko, mi kuŝiĝis pro dormi. Tiam ĝi eksonis flanke de mi:

„La herboj de la prerio sopiregas en la sunbrulo, kaj soifegas pri humideco kaj refreŝiĝo.“

Winnetou silentis, kaj ankaŭ mi ne diris unu vorton, scivole, kio sekvis nun. Post momento li pluis:

„Tiam la nokto venas kun sia rosumo, kaj kontentigas la bezonegon de la soifanta naturo.“

Post refoja paŭzo, li daŭrigis sian paroladon, kiu sonis, kvazaŭ li parolis al si mem:

„Kiel la sekaj herboj de la prerio al la rosumo, tiel Winnetou sopiris al venĝo pri Parranoh, la blanka ĉefo. Nun finfine la bilancigo proksimas.“

Mi rektiĝis mirigite.

„Blanka ĉefo, ĉu?“

„Jes. Ĉu mia frato neniam antaŭe aŭdis pri Parranoh, la kruela ĉefo de la Atabaskoj? Neniu scias, de kie li venis. Sed li estas fortega militisto, kaj estis akceptita en la konsil-anaron inter la ruĝaj viroj. Kiam la grizaj kapoj ĉiuj estis irintaj al Manitou, la Granda Spirito, li ricevis la kalumeton, kaj kolektis multajn skalpojn. Sed tiam li estis blindumigita de la malbona spirito, traktis siajn anojn kiel *nigger*-ojn, kaj devis fuĝi. Ekde tiam li loĝas en la konsilnaro de la Ponkoj, kaj kondukis ilin al grandaj agoj. Nun li volas ŝtormi kun ili la lignan fortikaĵon de la palvizaĝoj kaj elrabi ĝin, kiel mia frato Ŝarlih ĵus aŭskultis.“

„De kie mia ruĝa frato konas tiun viron?“

„Winnetou konkurigis sian tomahokon kun la lian, sed la blankulo estas plena je firuzeco; li ne batalas honeste. Sed tiun fojon li krucigas sian vojon kun tiu de Winne-

tou la lastan fojon. Manitou kondukis lin en la manon de la apaĉo, kaj neniu forto de la mondo povos savigi Parranoh:n. *Hough!*“

Mi aŭdis sonon flanke de mi, kiel ĝi estas farata, kiam iu kuŝiĝas sur la teron. Winnetou do ne plu volis esprimiĝi pri la afero. Fakte tio ja ankaŭ ne necesis, ĉar kio farendas je la neksta tago, estis evidenta, sen ke unu vorto devis est parolata pri tio.

Tial mi volviĝis en mian kovrotukon pro dormi. Ja multo, aŭ fakte ĉio ankoraŭ estas malklara al mi. Kiel mia ruĝa frato renkontis Parranoh:n? Kaj kiel la blankulo fariĝis celo de la malamo de mia alikaze tiel pardonema Winnetou? Tiuj estis neresponditaj demandoj. Sed ĉar mia amiko restis silentante pri tio, mi ankaŭ ne plu pensadis pri tio. Winnetou ne volis paroli, kaj tio estis difiniĝe al mi. Li ja ĉesos sian silentadon, kiam la ĝusta momento estus alveninta.

Kiam ni vekigiĝis je la sekvinta mateno, ni matenmanĝis pecon de sekigita bubalviando, tiam ni surĉevaliĝis.

Ni ne estis farinta interkonsentigon kio farendis, sed mi estis konvinkita, ke Winnetou pensis same kiel mi.

Estis tio, ke ni avertu la garnizonon de la fortikaĵo. Dum tio ni ne rajdu en la direkton, kiun la Ponkoj elektos laŭsupoze. Alikaze ili facile estus trovintaj nian spuron, kaj pridubiĝantaj. La fortikaĵo estis, de nia nuna pozicio, plenan tagrajdadon nord-okcidente. Do pro la ruĝuloj ni devis rajdi unue en nordan direkton. Nur kiam ni atingis la fluejon de la Niobrara, ni direktiĝis okcidenten. Ni rajdadis horlonge trans prerio, kiu konsistis plejparte el vastaj herbejoj, aliparte estis kovrita de solaj arbedaĵoj, kaj la suno jam estis sufiĉe malalte, kiam ni finfine vidis la fortikaĵon aperi antaŭ ni.

La Fort Niobrara estas situata tre utile. Ĝi estas konstruita sur libera altaĵo, kiu en la nordo krute malaltiĝas al la rivero. Je la aliaj flankoj ĝi estas ĉirkaŭata de transvidebla, libera areo, tiel ke ĝi almenaŭ dumtage estis nebla al la ruĝuloj ekatiki la lokon surprizige, sub la kondiĉo, ke la gardistaro faris sian devon. Sed ankaŭ dumnokte certe ne estis facile ataki la fortikaĵon. Sed estis novluno, kio treege faciligis la proksimiĝo de la malamiko. Sed se la tuta garnizono estus je iliaj postenoj, la atakontoj unue devis akcepti grandajn perdojn, antaŭ ili sukcesus grimpi trans la palisara barilo.

Mi ja estis kaŝaŭskultinta, ke la Ponkoj pensis, ke la garnizono havis neniun ideon pri la minacanta danĝero. Sed se tio ankaŭ ĝustis ĝis tiam, ni nun tieis pro nebligis tiun antaŭtakson, kaj ni ne hezitis minuton pro ekagi.

Ni elektis de arbedoj ĉirkaŭatan restejon, de kie ni havis liberan vidon al la eble mejlon vasta herbeja zono antaŭ la fortikaĵo. Tiam Winnetou deĉevaliĝis kaj piedkatenis sian Iltŝi:n, dum mi sole rajdis al la fortikaĵo.

Ekster la ĉirkaŭbarilo neniu homo estis videbla, sed kiam mi rajdis supren laŭ la kruteta flanko de la altaĵo, mi rimarkis, ke la fortikaĵo estis ne tute sen gardantoj, ĉar sur la malfermita pordego apogiĝis postenulon kun la karabeno en la brako.

„*Good evening!*“ mi salutis, kiam mi ĉesirigis mian virĉevalon antaŭ li. „Kiu estas estranta la fortikaĵon?“

La alparolito vidis al mi ekzamene, kio ŝajne certigis lin pri la pacemeco de mia persono, ĉar li respondis serveme al mia mallonga respondo.

„Colonel Merrill.“

„Tiun mi ne konas. Ĉu li estas tie ĉi?“

„Yes. Ĉu Vi volas paroli al la *colonel*?“

„Se Vi ne kontraŭas. Kie mi povas renkonti lin?“

„En la oficirejo. De tie ĉi, ĝi estas la domo —“

„M’jam scias! M’ne estas tie ĉi la unuan fojon, kaj konas la vojon. *Good bye!*“

Post tio mi plurajdis, laŭ mallonga, sed vasta strateto ĝis antaŭ malalta lignodometo, kiu diferenciĝis de la aliaj konstruaĵoj je nenio. Tie mi deĉevaliĝis kaj paŝis en malvastan koridoron, en kiu kondukis pluraj pordoj de ambaŭ flankoj. Mi frapis sur la unuan je la dekstra, kaj eniris post mallaŭta voko de la interno.

Je krude konstruita tablego, kiuj kune kun du same simplaj seĝoj estis la solaj meblaĵoj de la ĉambro, sidis du viroj, el kiu unu stariĝis dum mia enveno. Liaj militaristaj insignoj diris al mi, ke mi staris antaŭ la komandanto de la fortikaĵo.

Sed mi dediĉis al li nur duonan vidon, ĉar mia tuta atento estis okupata de la dua viro.

Kvankam li sidis, oni rimarkis liajn vere grandegulajn korpoformojn. Li surhavis franĝohavan, nur la genuojn atingantajn kaj je ambaŭ flankoj riĉe surbroditaj *leggings*:on, kies randoj estis en la alte suprenigitaj faldeblaj bototuboj, kamizolon el softe, blankigita kapreola ledo, mallongan cervoledan ĉasjakon, kaj sur tiu rigidan ĉemizon el bubala felo. Ĉirkaŭ la fortaj lumboj li estis volvinta vastan ledozonon, en kiuj estis la mallongaj armiloj, kaj ĉirkau lia kolo pendis longa ĉeno farita el la longaj dentoj de la griza urso, kaj de ĝi la pacopipo kun artlerte el la sankta argilo skulptita tabakujo. Ĉiuj ĉemizaj juntoj estis ornamitaj kun grizlaj ungegoj, kaj per tiuj ornamaĵoj kaj ankaŭ per la pipoĉeno oni povis rekoni, kiom da tiuj terurigaj bestoj jam estiĝis viktimoj de la kugloj de tiu grandegulo. De najlo en la muro pendis lia kastorĉapelo kun larĝa rando, de kiu malantaŭe pendis kastora vosto.

La okcidentulo jam pasis la mezon de sia vivo, sed lia okuloj vidis klare. Ili havis tian tipan, ne priskribeblan brilon, per kiuj eminentiĝas homoj, kiuj loĝas sur vastaj ebenaĵoj, do maristoj, dezertaj aŭ preriaz loĝantoj. Li havis longan, ĝis la brusto falantan, jam iomete griziĝintan barbon, kaj liaj kapharoj en la sama koloro abundis kiel leona kolhararo ĝis malalte trans la nuko.

Mi neniam estis vidinta tiun viron antaŭe, sed rekonis lin je la unua ekvido, ĉar mi estis aŭdinta pri li cent fojojn. Tiel, ekzakte tiel li estis priskribita al mi, kiam la *trapper*:oj ĉe la flagranta resteja fajro rakontis pri li kaj liaj agoj. Ekzakte tiel li vivis en la memoro de la ruĝaj viroj, egale, ĉu iliaj *wigwam*:oj staris tie fore en la nordo, sur la bordoj de la Saskatchewan aŭ malsupre en la sudo apud la Llano Estacado. Per unu vorto: estis neniu alia — sed Old Firehand.

Mi estis mirigita vidi lin tie ĉi, ĉar Winnetou kaj mi serĉis lin multe pli fore norde ĉe la Mankizita. Sed nun mi ne pensis pri tio. Io alia eĉ pli vekis mian miregon, jes, perplekson: el lia zono iĝis la teniloj de du tranĉiloj, kaj unu el ili mi konas tre bone, ĉar ĝi apartenis al — mi!

Subite ĉio klaris al mi. Ĝi do estis Old Firehand, kiu estis batalinta kun mi en la malhelo de la antaŭa nokto. Nun mi certe ne devis miri plu, ke mi ne estis sukcesinta venki

la viron. Venki Old Firehand:on en luktado! Kiam mi vidis al lia staturo, tiu intenco ŝajnis al mi preskaŭ priridinda. Certe la nura forto ne sukcesas ĉion. Sed ke tiu homo posedas ankaŭ la necesan lertecon, li estis sufiĉe pruvinta dum la hieraŭa nokto.

Ĉiujn tiujn ekkonojn mi faris dum malmultaj momentoj, ĉar la *colonel* demandis, apenaŭ ke mi estis enveninta:

„Kion Vi deziras de mi?“

„Ĉu mi estas ĝuste tie ĉi ĉe *Colonel* Merrill?“

„Yes. La *colonel* staras antaŭ Vi.“

„Well, do mi volas averti Vin. Ĉu Vi scias, ke Vi ekspektu indianan atakon?“

La komandanto ĵetis rapidan vidon flanken al la *trapper*.

„Kion Vi diras! Ĉu mi rajtas demandi, kiel Vi ekhavis tiun konon?“

„Kial ne? Mi kaŝaŭskultis la ruĝulojn.“

„Kiujn ruĝulojn?“

„Estis ponkoj, sub la komando de ilia ĉefo Parranoh.“

„Kie Vi renkontis ilin?“

„Tagrajdan distancon sudoriente de tie ĉi.“

Denove la *colonel* ĵetis vidon al la alia.

„Well, ĉu Vi ne bonvolas koncize doni raporton al mi?“

„Ŝate jes.“

Kiam mi komencis, Old Firehand stariĝis de sia seĝo kaj paŝis al ni. Mi rakontis, kion mi estis aŭskultinta, sed ne menciis Winnetou:n, nek mian noktan luktadon dum tio.

La *colonel* ofertis sian manon al mi, kiam mi estis finparolinta.

„Mann, mi ŝuldas grandan dankon al Vi. Malgraŭ ĉio mi ja ne estas tiel sencerbe, kiel la ruĝuloj opinias. Fakte mi jam estas avertita.“

„Tion mi povas pensi“, mi asertis mian konsenton. „Certe evidentiĝis al Vi, ke la fortikaĵo estis subite evitata de la indianoj.“

„Prave! Vi divenis ĝin. La ruĝuloj, kiuj kutime vagaĉas en la proksimo de la fortikaĵo, subite malaperis. Tio devis vekti mian suspekton.“

„Kiel forte la garnizono estas ĉi tempe?“

„Tridek viroj.“

„Tio ne vere sufiĉos kontraŭ cent ruĝuloj.“

„Sed ankaŭ ne tro malmultos. Mi ne timas antaŭ ili, ĉar mi havas viron je mia flanko, kun kiu mi bonvole povus akcepti la duoblan nombron da ili.“

„Vi certe parolas pri Old Firehand ĉi tie je Via flanko, ĉu?“

„Behold! Vi konas min, ĉu?“ la priparolito nun parolis la unuan fojon. „Mi ne memoras, ke mi iam vidis Vin antaŭe.“

„Mi ja ankaŭ ne vidis Vin antaŭe. Sed ĉu Vi pensas, ke mi estas tia *greenhorn*, kiu ne kapablas ekkoni Vin laŭ la priskribo, kiu ĉirkaŭiras en la tuta okzidento? Min nur miras, ke mi renkontas Vin tie ĉi. Ni serĉas Vin tute aliloke.“

„Vi serĉas min, ĉu? Kaj Vi diris ‚ni‘, do Vi ne estas sole, ĉu?“

„Ne! Mia ĉaskunulo atendas min ekstere je la rando de la arbedaro.“

„Kiu estas tiu?“

„Winnetou, la ĉefo de la apaĉoj.“

„Win—?“ La fama ĉasisto per surprizigo faris paŝon malantaŭen, kaj ankaŭ la *colonel* direktigis siajn grandigintajn okulojn al mi. „Winnetou estas tie ĉi, ĉu? *Mann*, mi diras al Vi, Vi ne estus povinta fari pli grandan ĝojon al mi ol per tiu mesaĝo.“

„Egad!“ *colonel* Merrill samsonis. „Nun mi des pli ne plu afliktiĝas. Sole kun Winnetou kaj Old Firehand mi pertime fuĝigos la tutan grupon.“

„Ne imagu, ke la afero estus tiel maldanĝera!“ mi ridetis.

„*Pshaw!*“ Old Firehand kontraŭis. „Vi ja ne timigu! Cetere Vi ne diris Vian propran nomon. Ĉu Vi estas — Vi ĉu ne ja eĉ estas —“

„Ĉu Vi volas diri Old Shatterhand? Tiel oni fakte nomas min.“

„Old Shatterhand!“ ambaŭ vokis kvazaŭ per unu buŝo, kaj la *colonel* aligis: „Old Shatterhand, Old Firehand kaj Winnetou! Kia feliĉa kuniĝo! La tri plej famaj viroj de la okcidento! La tri nevenkebluloj! Nun ĝi ja ne povos malsukcesi, nun la ruĝaj fiuloj pereos!“

La okuloj de Old Firehand estis plivastigintaj dum la sono de mia nomo. Nun li ekprenis mian manon kaj premis ĝin, ke mi preskaŭ volis ekkrii.

„Old Shatterhand! La sangofrato de Winnetou! La viro, pri kiu mi sorpiris vidi lin dum jaroj! *Mann*, amiko, korfrato, mi tute ne povas esprimi al Vi, kiel mi ĝojas!“

Mi liberiĝis de lia manpremo, kaj farante paŝon malantaŭen, mi ridetante vidis en la brilajn okulojn.

„Ĉu Vi vere seriozas pri tiu ĝojo?“

„Ĉu Vi do dubas?“

„Sed jes. Mi ankaŭ havas egan kaŭzon pro tio.“

„Mi ne komprenas Vin.“

„Ĉu ne? Do mi helpu al Vi repensi. Vi ja estis vere insistema hieraŭ nokton rompi mian kolon.“

Estis plezurege rigardi la miregon, kiu nun aperis sur lia vizaĝo.

„Ĉu mi — rompi — Vian kolon, ĉu —?“

„Ĉu Vi do ne kredas, kion mi diras? Vidu, jen la pruvo! De nia interbatalo Vi ankoraŭ portas mian tranĉilon en la zono.“

Estis preskaŭ senhelpa vido, kiun la grandegulo direktigis al mi. Tiam li igis mian tranĉilon el la zono, kaj hezite demandis:

„Tiu — ĉi tiu — estu Via tranĉilo, ĉu?“

„Ho jes. Kaj mi esperas, ke Vi estas tiel grandanima ĝin redoni al mi, kaj ne enarigi ĝin en Vian kolekton de venkemblemoj.“

Li donis la ŝtalaĵon al mi per hasta movo.

„*Damn it!* Kion Vi pensas? Jen Vi rehavu Vian *bowieknife*-on! Kaj — kaj pardonu —“

„*Nonsense!*“ Mi igis mian tranĉilon en la zonon kaj ekprenis la manon de Old Firehand, kiun nun mi premis laŭforte. „M’taksas, ke tie ĉi tute nenio pardonendas. Mi ja pensis hieraŭ, ke mia lasta horo estus veninta. Sed mi pensas, ke ni kvitas. Ĉar la fiatoj, kiuj mi donis al Vi, certe ankaŭ ne estis el papermaĉaĵo.“

Old Firehand ege elspiris.

„*Well*, tio vere estis la ĝusta parolo! Vi fakte ne estas postkolerema. Kaj la neksta grizlo, kiu iĝos sur mian vojon manĝu min, se mi ne taksos Vian bonanimecon sufiĉe alte.“

„Ni silentu pri tio!“ mi defendis. „La mano, kiu pezis tiel ege sur mi hieraŭ, estonte faru tiom bonan al mi.“

La *colonel* estis spektinta tiun tutan interludon senkomprene. Kelkaj vortoj nun klarigis la okaziĝojn al li, kaj li faris la plej ruzan aĵon, kiu farindis pri tiu ĉi afero, li komprenis ĝin esti nura ŝercaĵo.

„*Heavens!*“ li ridis. „Tiu estas la plej bone elpensita spritaĵo, kiun mi aŭdis dum jaroj! La du plej bonaj amikoj de Winnetou klopodas rompi la kolon de la alia! Tio belegas — tio nur estas — ha—ha—ha!“

Ni ne povis eviti ĝin, ni kunridis laŭ lia ridado, kaj per tio la afero estis forgesita.

Per mia demando, kiel Old Firehand estis veninta al la ponkoj, li respondis:

„Tio estas rapide rakontata. Niaj pafbezonaĵoj elĉerpiĝis, kaj tial mi iris tien ĉi pro aĉeti pulvon. La *colonel* parolis al mi pri lia suspekto, kaj mi ofertis al li iri esploradi. Mi rajdis laŭ la spuroj de malaperiĝintaj ruĝuloj, kaj tiel proksimiĝis al ilia restejo. Dum la provo kaŝiri al ili, mi renkontis Vin, kaj tial ne sukcesis plenumigi mian eksintencon. Sed estis klariĝinta al mi, ke la ruĝuloj fakte planis ataki la fortikaĵon, kaj mi rajdis reen plej rapide. Mi alvenis tie ĉi antaŭ du horoj, kaj pliparolis la necesajn rimedojn kun la *colonel*, pro akcepti la *indsman*-ojn. Bedaŭrinde ni ne konis la tempon de ilia ekatako. Jen aperis Vi, kaj nun ni eĉ klaras pri la lasta nekonata punkto. Ni nun scias, ke ni ekspektu la ponkojn morgaŭ frue.“

„Kaj kion Vi planas fari?“

„Estas cent ruĝaj fiuloj, pri kiuj ni ne longe interkonsilu. Ni mortpafos ilin ĉiujn.“

„Ili estas homoj, *Sir*“, mi enĵetis.

„Jes, homoj bestiĝintaj“, li kontraŭis. „Mi aŭdis sufiĉe de Vi pro scii, ke Vi estas tolerema pri tiuj fiuloj eĉ en la plej ega danĝero. Sed mi havas alian opinion. Se Vi estus spertinta, kion estis spertinta mi, nenio povus rakonti pri Old Shatterhand, la pardonemulo. Kaj ĉar la trupo estas komandata de Parranoh, la apostato, la centfoja mordisto, mia tomahoko formanĝu ilin des pli. Mi devas bilancigi fakturon kun li, fakturo, kiu estis skribita per sango.“

„Vi pravas“, la *colonel* asertis. „Indulgo tie ĉi estus je la malĝusta loko.“

„Bone, mi ne volas kontraŭi“, mi diris. „Sed ĉu Vi ne pensas ke ĝi estus pli bone prkrasti Vian decidon, ĝis Winnetou estos espriminta sian opinion pri ĉi tiu afero?“

„Egad! Tiun mi jam preskaŭ forgesintis! Ĉu Vi ne diris, ke li atendas tie ekstere je la rando de la arbedaro?“

„Jes, kaj mi nun venigos lin, pro —“

„*Stop!*“ Old Firehand interrompis, „bonvolu lasi fari tion ĉi min! Mi treege antaŭsentas ĝojon pri la revido kun li.“

„Mi ŝate permesos tion. Mi do restos tie ĉi. La lokon, kie Winnetou restas, mi certe ne devos priskribi al viro kiel Vi. Vi ĝin trovos sambone mem.“

„*All right!*“ dum tiuj vortoj li ankaŭ jam estis ŝirinta sian kastoran ĉapelon kaj elirinta tra la pordo.

Kiam Winnetou venis poste, ni unue manĝis. Post tio oni interkonsilis pri la detaloj, kiel la ruĝuloj povus esti plej bone akceptataj.

Pro laŭeble faciligi la kaŝalvenon al ili, la eksterna gardisto estu reprenata, kaj ankaŭ ĉiel cetere estu farata la impreson, kvazaŭ la garnizono havus tute nenian ideon pri la minacanta danĝero. Ĉiu viro ricevu krom la pafilo kun bajoneto ankaŭ revolveron kaj *bowie*-tranĉilon. Gravis regali la malamikojn jam je la unua atako tiamaniere, ke ili estus laŭeble malfortigataj, devis rezigni pri ilia plano, kaj komplete perdu la emon pri similaj diablaĵoj.

La ĉefaĵo do estis, ne nur akcepti la ponkojn, sed ŝtormi en ilian mezon dum la unua konfuzo. Dek viroj el la garnizono estis dragonoj. Post la unua pafaro ili surĉevaliĝu kaj faru eliran atakon, kio ja devos eĉ altigi la konfuzon de la ruĝuloj, kiuj ja venos kaŝirante sen ĉevaloj.

La indianoj ĝenerale ne atakas antaŭ la matena krepusko. Ja ne estis ekspektinda, ke ili farus escepton ĉi fojon, sed oni tamen devis pensi pri tiu ebleco. Tial la tuta garnizono staris prete malantaŭ la palisaro jam antaŭ noktomezo, kun la pafiloj en la manoj. La viroj estis, ĉar la atako certe apenaŭ estus venonta de la rivera flanko, disiĝintaj sur la tri aliaj flankoj. Tamen ankaŭ al la rivero estis starigata postenulo, pro povi reagi al ĉia surprizaĵo.

La tempo pasiĝis turmente malrapide, kaj la kvaronhoroj ŝajne longiĝis al horoj. Nia pacienco estis ege ekzamenata, ĉar okaziĝis tute nenio, kio konkludigis al proksimiĝo de la ruĝuloj. Sed tamen ni sciis ekzakte, ke tie ekstere atendis cent sangavidaj *indsmen*-oj, ke ili povis ekataki nin.

Finfine la matena krepusko komencis kun maldensa nebulo, kiu faciligis la intencon de la ruĝuloj veni proksime al la fortikaĵo. Al ni kontraŭe tio malutilis, ĉar neebulis klaran vidon eksteren. Sed la elvido feliĉe ĉiam pli boniĝis. Post mallonga tempo estis eble al ni, vidi almenaŭ al la pli alta parto de la altaĵa flanko ankaŭ ni. Sed neniu indiano videbliĝis.

Finfine la vaporaj supro je la bazo de la altaĵo maldensiĝis, kaj malkaŝis laŭforme ja nerekoncible, sed tamen certe videblan vastan, malluman ombraĵon. Ĝiaj konturoj ĉiam pli klariĝis — la ponkoj venis.

„*Have care* — atentul!“ Old Firehand flustris. „Ne pafu, antaŭ ke mi estis dirinta la ordonon!“

La senforma ombraĵo nun estis rekoneble neordigita aro de homoj. La ruĝuloj ŝajnis esti tre certaj pri ilia plano, ĉar ili ne venis en longa vico, kiu ĉirkaŭis la tutan altaĵon, sed en tre densa aro. La tempo de la decidigo estis veninta.

Ili estis alveninta al distanco de kvindek metroj, kiam eksonis la voĉo de Old Firehand: „Pafu!“

Nia pafaro krakegis, kaj tuj la aro de la *indsmen*-oj iĝis ĥaosa amasaĵo. Tian akcepton la ruĝuloj ne estis ekspektintaj. Momenton ĉio kvietis, sed tiam la aero tremiĝis per sovaĝa hurlado, la militokrio de la suoj, kaj kun resvingataj tomahokoj ili venis ŝtormante al la ĉirkaŭbarilo.

„Pafu!“ Old Firehand ordonis duan fojon, kaj refoje la pafiloj malŝargiĝis kontraŭ la alŝtormantoj.

„La rajdantoj eliru!“ la voko de la okzidentulo nun superonis la kriadon de la ruĝuloj. Tuj la pordego estis malfermata, kaj la dek dragonoj elŝtormis, malsupren laŭ la altaĵo, kaj meze en la plej densan grupon de la malamikoj.

Mi elsendis pafon post pafon de malantaŭ la palisaro el mia Henry-pafilo en la amason de la atakantoj, sed mi ĉiam strebis al ne mortigi la kontraŭulon, sed nur malkapabligi lin batali. Kiam mi estis pafinta mian lastan kuglon, mi ĉirkaŭrigardis. Old Firehand kaj Winnetou, kiuj estis starintaj flanke de mi, nun ne plu videblis. Ili estis, kiel mi eksciis poste, tuj svingiĝintaj trans la ĉirkaŭbarilo kaj ŝtormintaj al la malamikoj. Ankaŭ mi nun lasis ursmortigilon kaj Henry-pafilon, kiuj nur estus estinta malutila al mi. Rekte malantaŭ la dragonoj la alia garnizona trupo estis kurintaj tra la pordego, kaj mi nun kuregis post ili, tenante la revolveron en la dekstra mano. Malantaŭ mi la pordego estis refermata.

En la unua surpriziĝo kaj per la alŝtormo de la dragonoj, la indianoj estis pelitaj reen al la bazo de la altaĵo. Sed tie ili estis haltigita de Parranoh, kiu ne havis la emon tiel baldaŭ rezigni pri la venko, kiun li estis kredinta gajni tiel facile. Kvankam lia aro estis malfortigita de niaj du pafaroj, li tamen ankoraŭ havis avantaĝon kontraŭ ni. Almenaŭ laŭnombre liaj anoj estis ankoraŭ pli forte ol ni duoble.

Pasante mortulojn kaj vundigitajn, kiuj kovris la altaĵan deklivon, mi kuregis al la batalejo. Old Firehand kaj Winnetou troviĝis en la plej densa amaso de la malamikoj.

Winnetou:n mi sufiĉe konis, kaj tial ne atentigis pri li. Kontraŭe ĝi pelis min perforte en la proksimecon de Old Firehand, kies aspekto memoris min pri tiuj oldaj herooj, pri kiuj mi estis leginta kiam mi ankoraŭ estis knabo. Kun disigitaj kruroj li jen staris rekte, kaj lasis la indianojn peli de la fortikaĵaj soldatoj al sia milithakilo, kiu, regate de grandega pugno, disbatege iĝis sur la kapojn de la malamikoj. La longaj, leonkolecaj haroj estis blovitaj ĉirkaŭ la senĉapela kapo, kaj en lia vizaĝo esprimiĝis sovaĝa venkocerteco.

Nun mi ekvidis Parranoh:n en la amaso de la indianoj kaj klopodis veni al li. Cedante for de mi, li iĝis en la proksimon de Winnetou, sed volis ankaŭ eviti lin. Winnetou vidis tion, saltis al li kaj vokis:

„Parranoh! Ĉu la hundo de la atabaskoj volas kuri for de Winnetou, la ĉefo de la apaĉoj? La buŝo de la tero trinku lian sangon, kaj la ungego de la vulturo disŝiru la korpon de la perfidulo!“

Li forĵetis la tomahokon, ŝiris la tranĉilon el la zono, kaj ekprenegis la blankan ĉefon je la gorĝo. Sed li estis malebligata ekfari la mortigan pikon.

Kiam Winnetou tute kontraŭe al sia cetera kutimo saltis al la ponko kun tiel minacanta voko, Old Firehand estis tranŝjetinta vidon, kiu trafis la vizaĝon de la malamiko. Tio daŭris nur sekundon, sed la ĉasisto tamen estis rekoninta la viron, kiun li malamis en ĉiu ero de sia interno, kiun li estis vane serĉinta kun senresta fervoro, kaj kiu nun finfine ekaperis antaŭ lia okulo.

„Tom Finnetey!“ li kriis, dispuŝis la indianojn flanken kiel herbtigojn, kaj saltis al Winnetou, kies manon, kiu estis resvinginta pro puŝo, li nun ekprenis.

„Haltu, frato, tiu ĉi viro estas mia!“

Parranoh staris fiksigitte de teruro, kiam li aŭdis sian veran nomon. Sed apenaŭ li estis rekoninta Old Firehand:on, li ŝiriĝis for de la mano de Winnetou, kiu estis

partiginta sian atenton, kaj li forkuris rapide kvazaŭ pafite de arko. Tuj ankaŭ mi liberigis de la indiano, kun kiu mi estis interbatalanta dum tiu ĉi okaziĝo, kaj kure sekvis la fuĝanton. Li devis esti mia. Mi ja tute ne havis nefaritan bilancon pri li, sed eĉ se li, kiel kaŭzinto de la atako, ne estus meritanta kuglon, mi nun sciis tamen, ke li estis ĝismorta malamiko de Winnetou. Kaj ĵus la okaziĝo eksciigis min, ke ankaŭ al Old Firehand ĝi estis gravega ekkapti tiun blankan ĉefon de la ponkoj.

Ambaŭ ankaŭ tuj estis ekkurintaj pro persekuto. Sed estis videble, ke ili ne povis malgrandigi la antaŭecon, kiun mi havis, ankaŭ des malpli, ju ke mi rimarkis je la sama tempo, ke tiu ulo antaŭ mi estis bonega kuranto. Old Firehand sendube estis majstroj en ĉiuj kapabloj, kiujn vivo en la okcidento postulas, sed li tamen ne plu troviĝis en la aĝo, kiu faciligas vetkuradon pri morto aŭ vivo, kaj Winnetou, kiel li poste diris al mi, estis perdinta tempon, ĉar li estis mispaŝinta kaj faletinta.

Je mia kontentiĝo mi ekkonis, ke Parranoh faris la eraron senatente kuri nur rekte antaŭen, sen mezurigi siajn fortojn, kaj ne agis per la ŝoko laŭ la malnova metodo de la indianoj fuĝi zigzage, dum mi provis ŝpari mian spiron kaj interŝanĝis la penojn de la kurado metante ĝin sur ĉiam alian kruron, maniero, kiu estis estinta ĉiam utilaĵo al mi.

La du aliaj ĉiam pli malantaŭiĝis, tiel ke mi ne plu aŭdis la egan spiradon, kiun mi estis aŭdinta, kaj nun ankaŭ jam de sufiĉa malproksimeco eksonis la voĉo de Winnetou:

„Old Firehand haltu! Mia blanka frato ekkaptos kaj mortigos la bufon de la atabaskoj. Li havas la piedojn de la ventego, kaj neniu sukcesos fuĝi de li.“

Mi ne povis vidi reen pro ekscii, ĉu la kolera ĉasisto ankaŭ agis laŭ tiuj vortoj. Parranoh estis nun atinginta la randon de la arbedaron, kaj mi kunmetu ĉiun mian atentigon pro ne perdi min el mia vido.

Nun mi estis proksimiĝinta al la fuĝanto je dudek paŝoj. Se li sukcesis igi plurajn arbedojn inter mi kaj li kiel kovraĵoj, li povus sukcesi fuĝi de mi. Tial mi plilongigis miajn paŝojn, kaj post mallonga tempo mi kuregis tiel proksime malantaŭ li, ke mi povis aŭdi lian anhelantan spiradon. Mi ne kunhavis alian armilon escepte de la du finpafitaj revolveroj kaj la *bowie*-tranĉilo. Tiun mi nun tiris el la zono.

Tiam subite Parranoh rapidiĝis flanken, pro lasi min plenforte kuri pasante preter si, kaj tiam ataki min de malantaŭe. Sed mi estis ekspekinta tiun finton, kaj flankeniĝis en la sama momento, tiel ke ni kunpuŝiĝis per ĉiu forto, dum kio mia tranĉilo iĝis ĝis la tenilo en lian korpon.

La kunpuŝiĝo estis tiel forte, ke ni ambaŭ falis sur la teron, de kie sed Parranoh ne plu altiĝis, dum mi mem tuj restariĝis, ĉar mi ja ne povis scii, ĉu mi estis trafinta lin mortige. Sed li movigis neniun membron, kaj mi ne plu rekonsis ian signon de vivo pri li. Ege enspirante mi retiris la tranĉilon.

Ne estis la unua malamiko, kiun mi estis mortiginta, kaj mia korpo havas ĉiaspecajn memorilojn pri kelkaj ne ĉiam feliĉe finiĝinta interbatalo kun la batalspertaj loĝantoj de la amerikaj stepoj, sed tie ĉi kuŝis blankulo antaŭ mi, kiu estis mortigita de mia armilo, kaj mi ne povis eviti ĝenecan senton. Sed li estis ĉiukaze meritiĝinta la morton, kaj ne valoris bedaŭron.

Dum mi ankoraŭ pripensis, kiun signon de mia venko mi devis demeti, mi aŭdis

malantaŭ mi la hastan kuradon de homo. Mi rapide faliĝis sur la teron. Sed mi ne devis timi ion, ĉar estis Winnetou, kiu tamen estis sekvinta min en amikeca zorgo, kaj nun haltis je mia flanko.

„Ŝarlih estas rapide kiel la sago, kaj lia tranĉilo certe trafas sian celon“, li diris, kiam li ekvidis la mortulon kuŝi. „Ĉu mia frato ne volas dekoracii sin per la skalpa buklo de la atabasko?“

Mirigite mi vidis al Winnetou.

„Vi scias, ke mi neniam deprenas la kaphaŭton de malamiko.“

„Tiukaze ĝi estas mia!“ li vokis per sono tiel kolere, kiel mi neniam antaŭe estis aŭdinta ĝin de li.

En la neksta momento li estis ĵetinta sin sur la mortulon, kiu kuŝis sur la dorso, metis la dekstran genuon sur lian bruston, kaj deigis la kaphaŭton de lia kranio per tri tranĉoj.

Se mi dirus, ke mi estus mirigite de la agmaniero de Winnetou, tiu esprimo estus tro malĝusta. Ne, mi estis rekte konsternita. Mi estis flartinta al mi mem per la penso, ke mia ruĝa frato estis akirinta per la kontakto kun mi tiom da humaneco, ke li delonge estis rezigninta pri tiu indiana kutimo. Almenaŭ li ne estis aginta laŭ tiu barbara moro en mia ĉeesto. Sed nun je unu fojo lia indiana naturo estis revekiĝinta, fakte en maniero, kiu estis tute fremda al mi je Winnetou. Eĉ li estis rifuzinta ĝis nun rekte, dekoracii sin per signo de venko, kiun li ne estis akirinta mem.

Kiel kolere malamis la alikaze tiel homamema apaĉo tiun Tom Finnetey:n, ke li deprenis lian kaphaŭton! Per tiu klarigo mi intertempe devis kontentiĝi. La plej detala kompreno de tio mi estis eksciinta nur pli poste, post kelkaj tagoj, ĉar ĝi forigis la vualon de okaziĝo, kiun li estis tentinta kiel sekreto en lia koro, kiun li estis kaŝinta antaŭ ĉiuj homoj, ankaŭ antaŭ mi.

Post Winnetou estis fiksinta la skalpon je la zono kaj purviŝinta sian sangan tranĉilon per herbo, li stariĝis kaj turniĝis al la direkto reen al la fortikaĵo. Mi tuj sekvis lin silente, kaj dum tio ne havis la tempon pensadi pri la rilato, kiu estis inter Winnetou kaj Parranoh. Alia penso iĝis peze sur mian bruston, fakte afliktiĝo pri Old Firehand. Li delonge devis esti ĉe ni. Eble li estis, kiam li ne plu estis vidinta Winnetou:n, estis elektinta malĝustan direkton.

Tiam mi aŭdis vokon, kiu iĝis al ni el fora distanco.

„Uf!“ Winnetou hezitis. „Tio certe estas nia frato Old Firehand, ĉar la fuĝantaj ponkoj certe ne ekideos evidentiĝi per vokado.“

„Tio estas ankaŭ mia opinio. Kaj la soldatoj certe ne tiel malproksimiĝis de la fortikaĵo. Sekve tio ankaŭ certe ne estas iu el ili. Ni rapide kuru tien!“

„Jes, rapide! Nia kunulo estas en danĝero, alikaze li ne vokus.“

Ni ekmoviĝis. Winnetou norden, sed mi orienten. Tial ni tuj haltis, kaj la apaĉo demandis:

„Kial mi frato Ŝarlih kuras tien? Ĝi estis en la nordo.“

„Ne, en la oriento! Aŭdu!“

La voko ripetiĝis, kaj mi tute certiĝis pri mia opinio.

„Ĝi estas en la oriento; mi aŭdis ĝin tre klare“, mi konstatis.

„Ĝi estas en la nordo; mia blanka frato eraras refoje.“

„Kaj mi estas konvinkita, ke mi pravas. Sed ni ne havas la tempon ĝustigi la malĝustan opinion. Do Winnetou iru norden, dum mi kuros orienten; unu el ni tiel certe trovos lin.“

„Howgh!“

Post tiu vorto li ekkuris, kaj mi hastis, tiel rapide kiel mi povis al la de mi certigita direkto. Jam post mallonga tempo mi ekkonis, ke Winnetou eraris, ĉar la voko refoje sonis, eĉ multe pli klare ol antaŭe.

„Mi venas, Old Firehand, mi venas!“ mi kriis. La savano estis surkreskita de solaj arbedaroj, kiuj baris liberan vidon al ĉiuj flankoj. Sed tio ne estis malhelpo al mi; mi ja nun konis la direkton. Dum la kurado mi reŝarĝis miajn finpafitajn revolverojn, kaj tiam mi vidis, kurinte ĉirkaŭ arbedon, grupon de interbatalantaj homoj antaŭ mi.

Old Firehand estis laŭŝajne lezite falinta. Li surgenuis sur la tero kaj defendiĝis kontraŭ tri malamikoj, dum li jam estis nedanĝeriginta tri aliajn. Ĉiu bato povis pereigi lian vivon, kaj estis la plej urĝa tempo, ke mi helpis al li. Kelkaj paŝegoj igis min en alpafeblan distancon. Tri rapide sekviĝantaj pafoj el unu revolvero, kaj la kontraŭuloj falis sur la teron. Mi kuris plu al Old Firehand.

„Dank’ al Dio! Tio ĵus estis je la ĝusta tempo, ĵus en la ĝusta momento, *Sir!*“ li vokis al mi.

„Vi estas lezita, ĉu?“ mi demandis, haltante ĉe li. „Sed ne danĝere, mi volas esperi.“

„Certe ne vivodanĝere. Du tomahokaj batoj en la femurojn! La uloj ne povis bati supre sur mian korpon; tial ili hakis malsupre en la krurojn, tielke mi devis fali.“

„Tio estos multe da sangoperdo. Permesu, ke mi ekzamenas Vin!“

„*Well*, ŝate! — Sed, *Sir*, kia pafanto Vi estas! Vi pafis ilin ĉiujn en la femuron el tiu distanco! Tiam aĵon nur Old Shatterhand kapablas! Mi ne sekvis Vin, kiam ni estis persekutantaj Tom Finnetey:n, ĉar mi havas sagovundon en la kruro, kiu malebligis kuradon al mi. Mi serĉis Vin; kiam tiuj ses ruĝuloj subite kvazaŭ ekkreskis el la tero. Mi nur havis mian tranĉilon kaj la pugnojn, ĉar mi estis forĵetinta la alian armilojn, proke mi povis kuri pli bone. Mi mortpikis tri el ili; la aliaj tri certe estus malvarmigintaj min, se Vi ne estus veninta. Mi ĉiam ŝuldos tion al Old Shatterhand.“

Dum li rakontis, mi ekzamenis liajn vundojn. Ili estis dolorigaj, sed feliĉe ne danĝeraj. Poste mi raportis al li laŭeble koncize pri la persekutado de Parranoh. Old Firehand diris neniun vorton pri tio.

Tiam venis Winnetou, kiu estis aŭdinta la krakaron de mia revolvero, kaj helpis al mi bandaĝi Old Firehand-on. Li senĝene konfesis, ke li estis erarigita hodiaŭ unu fojon de lia alikaze vere bonega aŭdokapablo. Ni lasis la ruĝulojn kuŝi, kie ili estis kaj reeniris al la fortikaĵo, kompreneble nur malrapide, ĉar Old Firehand ne povis iri tre rapide.

Kiam ni atingis la randon de la arbedaron kaj vidis la fortikaĵon antaŭ ni, la ruĝuloj estis malaperintaj. La batalado estis finigita, kaj la garnizono jam okupiĝis per amasigi la mortulojn kaj porti la lezitojn en la fortikaĵon. La bajonetoj de la infanterianoj kaj la sabroj de la dragonoj estis farintaj riĉan rikolton je la ponkoj. De la partio de la atakintoj ni nombris kvardek kvin mortulojn kaj dudek tri lezitojn, kiuj ne estis estintaj en

la stato fuĝi kun la aliaj — horora instruo, kiu certe estis averto la la travivintaj ruĝuloj longan tempon. Feliĉe en nia partio ne estis mortuloj, nur lezitoj.

Ni ankoraŭ okupiĝis, post ke ni zorgis pro la flegado de Old Firehand, kiam la dragonoj revenis de la persekutado. Ankaŭ ili ne devis plendi pri mortuloj, kvankam ja neniu povis travivi sen ia vundo. Kiel rekompenco ili alportis sufiĉe grandan akiraĵon, fakte longan vicon de sesdek ĉevaloj.

Intertempe la mateno estis komenciĝinta, hele kaj brile. La suno ridis tiel amikece malsupren sur nin, kvazaŭ tie ĉi ekzistus tute nenia malamo kaj nenia malamikeco, nenia murdo kaj neniu sangoverŝo.

La lezaĵoj de Old Firehand devigis nin atendi tie du semajnojn aŭ eĉ pli longe, ĝis li rekapablis rajdi. Tio signifis al mi kaj Winnetou tempon de restado, kiu ankaŭ ne venis nevolite. Ni estis elrajdintaj pro renkonti Old Firehand:on. Tio okazis. Kaj ĉu ni alvenis al lia *hide-spot* kelkajn tagojn antaŭe aŭ poste, tio povis esti egala al ni.

Je la sekvinta tago la mortaj *indsmen*:oj estis enterigataj. Antaŭe oni estis ekzameninta la proksimon kaj malproksimon de la fortikaĵo, kaj farinta surprizan trovon. Verŝajne tamen malamikoj estis tieinta hieraŭ. Ja oni retrovos la ruĝulojn, kiuj estis atakintaj Old Firehand:on, sed la loko, kie mi estis mortiginta Parranoh:n, estis malplena. Liaj samtribanoj certe serĉis kaj trovis lin, pro doni al li dignan entombigon en ilia vilaĝo.

La lezitaĵoj estis bandaĝataj kaj flegataj. La okazo estis raportita tuj al Fort Randall, kaj ses tagojn poste alvenis de tie plifortigo de dudek viroj. Ili kunalportis la ordonon de iliaj *colonel* sendi la kaptitojn post ilia resaniĝo per sufiĉa gardo al Fort Randall, kie ili estu juĝataj.

Mi fakte atendis nun, post ke Parranoh estis mortigita, ricevi klarigon de Winnetou aŭ Old Firehand pri ilia rilato al la mortulo. Sed ambaŭ silentis: ili plukaŝis ilian sekreton, kaj mi ne sentis, ke mi havis la rajton demandi pri detale pri ĝi kontraŭ ilia volo. Tial mi faris neniun demandon, kaj tiel la nomo Parranoh ne plu estis menciata inter ni dum tiuj tagoj.